
# la naska fasko

Ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero dek unu
2008-07-14
Lundo


## La Esperanto-movado en Nepalo



En 1957 s-ro Tibor SEKELJ venis al Nepalo kaj kreis la Esperanto-movadon. Dank' al li, la internacia lingvo jam kreis sian 50-jaran historion en Nepalo. Dum lia vojaĝo al Nepalo, li instruis kelkajn gejunulojn kaj fine rezultis fondiĝo de la Katmandua Esperanto-Societo.

Poste venis Simo MILOJEVIĈ kiu instruis dum 8 monatoj al pli ol 200 studentoj. Poste la movado stagnis pro diversaj kialoj.

En la jaro 1990 denove la movado trovis novan energion kiam venis Joachim WERDEN el Pollando por instrui Esperanton en Katmanduo. Lingva Instituto *Quest* donis ĉambron por la instruado. Lernis ĝin proksimume cent homoj. Ankaŭ mi ekkomencis Esperanto-kurson tiam. Je la fino de la kurso, ni novaj gelernantoj fondis Nepalan Esperanto-Asocion (NEspA) kun helpo de s-roj Philip PIERCE kaj Marco ONO.

Dua vizito de Werdin al Nepalo en 1991 plifortigis la asocion kaj ĝian movadon, kiam okazis kursoj en Katmanduo kaj en Patano. Pli ol cent gejunuloj denove lernis la lingvon. Krome okazis la unua kongreso de NEspA kaj ĝi eldonis sian bultenon *Montejo*. La membroj renkontiĝis dum sabatoj kaj praktikadis la lingvon, kaj la estraro kunvenis ĉiumonate.

De 1994 nepalaj geesperantistoj daŭre partoprenas en Universalaj Kongresoj dank' al subteno de diversaj organizoj kaj de NEspA mem.

En 1995 okazis la Unua Internacia Himalaja Renkontiĝo kiu venigis dekojn da geesperantistoj el diversaj landoj. Ĝuante la lingvon kaj diskutante pri la movado, ili piedvagadis ĉirkaŭ la montaro. La tradicio okazigi la renkontiĝon en ĉiu dua jaro daŭras. La sepa Internacia Himalaja Renkontiĝo okazis en Februaro 2007, kaj la oka okazos en la venonta jaro.

En 2002 la gejunuloj de NEspA sukcese fondis la Nepalan Junularan Organizon (NEJO) kiu daŭras ĝis nun. En 2006, ili eldonis sian bultenon *Templo*. Partoprenis gejunuloj en kelkaj Internaciaj Junularaj Kongresoj (IJK).

En 2002 NEspA fondis Orientan Nepalan Esperanto-Societon (ONES) kiel filion de NEspA, kaj poste sekvis la filio en Pokhara. En pasintaj jaroj proksimume 500 homoj jam lernis kaj uzas la lingvon. Nun NEspA havas preskaŭ 300 membrojn. Multaj loĝas en diversaj landoj por ilia propra studado kaj laboro.

—Indu

[Adaptita el historio de Razen MANANDHAR, nepala ĵurnalisto]

Ne plu ĝisu; Restu. Kisu.
Eku rito, ne evito.
Kun konsento dum momento,
kune leku, veku, "peku".
Per pasia tuŝo "fia",
ŝvite ĝuu; amo fluu.
Vivu riĉe kaj feliĉe:
Ardu lite, ne milite!

—*Aĉjo*

## Kalembura kadro




La lasta enigmo estis **"PRIMA-DONO"**
La hodiaŭa estas: **E _ - _ _ _ O J**

# El la kalendaro…

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe **http://esperanto.org/nask/kalendaro**

| | **lundo** | **mardo** | **merkredo** | **ĵaŭdo** |
|---|---|---|---|---|
| **matene** | klasoj | klasoj | klasoj | klasoj |
| **post-tagmeze** | 2:15 ptm: arĥitektura ekskurso kun Grant | *libera* | 3 ptm: David JORDAN prelegas | 3 ptm: Amri WANDEL prelegas |
| **vespere** | 7:30 ptm: Birke kaj Bertilo muzikas | 7 ptm: kantu kun Koto (Salono en Asante #122) | 7 ptm: Hoss parolas pri veganismo | 7 ptm: deklamu poezion kun Esther |

## Grizo

Estis grize. La matena suno luktis brili tra la densaj nuboj. Bluon prokrastis krepusko, montrante nur apenaŭ elteneblan grizon. Jen la kutimo. Jen mia malgajo.

Mi sentis min subpremita. Pro la griza ĉielo mi certis ke mi malsukcesos, fuŝos ĉion. Marŝigite al la manĝejo de mia stomako, mi maĉis magran manĝon sengustume, silente, zorgante pri ontaj ebloj, dronante en pensoj. La menso estis plenplena de nebulo.

Subite miaj okuloj pli larĝe malfermiĝis, la koro bategis en mia brusto. Venis ideo, brila ideo! Mi ekstaris haste, faligante la seĝon kun laŭta bruo. La aliaj manĝantoj rigardis min suspekte dum mi kuris trans la halon. Tie mi elektis frukton, verdan, plej grandan. Kun figaja rideto mi kaŝis ĝin en mia sako, kaj paradis al la klaso.

Mi alvenis iom malfrue, sed la instruisto ankoraŭ ne venis. Mi eltiris mian trezoron kaj metis ĝin sur la tablon de la instruisto. La aliaj studentoj grumblis mire, malkontente. Mi eksidis kaj atendis senpacience. Preskaŭ tuj la moŝto eniris. La studentaro eksilentis.

La gramatikisto metis sian verkon sur la tablon apud mia donaco. Li klinis sian kapon kaj rigardis ĝin pro konfuzo.

"Kies?" li postulis.

Mi levis la manon fiere. "La via, moŝto. Jen pomego por vi."

Mi estis memkontenta pro mia spriteco. Sed la aŭtoro de la PoMEGo malridetis.* Mia vizaĝo ekgriziĝis dum li parolis per malaproba voĉo* jene:

"Mi havas alergion kontraŭ pomoj."

—Simono

* *Noto de Bertilo:* Malridetis? Malaproba voĉo? Ho ve! Tio ne povas esti vero! Mi petas ŝanĝi al "afable ridetis kun suna vizaĝo" kaj "velura kaj sorĉe bela voĉo".

# Kio okazas hodiaŭ?

### ★ 2:15 ptm: Renkontiĝu antaŭ Asante

Ĉu *Muir College* estas "modernisma juvelo", kiel kelkaj diras, aŭ elstara ekzemplo de malbeleco, kiel pensas aliaj? Vi decidu, sed informiĝu unue en malstreĉa promeno tra la kolegio. Grant GOODALL gvidos nin kaj parolos pri la historio de la konstruaĵoj kaj la celoj de la arĥitektoj.



Birke DOCKHORN

### ★ 7:30 ptm: Birke kaj Bertilo koncertos en la komuna salono

Birke kaj Bertilo regalos nin per gitaro, fluto kaj kantado. Venu al la komuna salono je la 7:30 por aŭskulti iliajn kantojn kaj originalajn kaj tradukitajn.

# Mallonga historio de Kalifornio

La unuaj homoj en Kalifornio estis la indiĝenoj, kiuj konsistis el multaj popoloj loĝantaj ĉi tie dum jarmiloj. La unuaj eŭropanoj ĉi tie estis la hispanoj. Ili unue alvenis en la jaro 1542, dum ili esploris norden laŭ la marbordo de Meksiko. La unua urbo en la regiono nomota "Supra Kalifornio" estis San-Diego, fondita en la jaro 1769.

Komence estis nur la *Presidio*, kiu estis speco de fortreso, kaj la misiejo, kiu estis franciskana monaĥejo. Ĉirkaŭ tiuj ĉi du kreskis la urbo. Katolika pastro Junípero SERRA, kiu fondis la misiejon ĉe San-Diego, iris plu norden por esplori kaj fondi pliajn misiejojn. Eventuale, dudek unu misiejoj estis fonditaj. Ili faris ĉenon laŭ la kalifornia marbordo, kaj inter ili estas la "Vojo de la Reĝo" (aŭ hispane, *El Camino Real*), kiu ligis la misiejojn.

Cetere, estis tri pliaj fortresoj. Post San-Diego estis la Presidio ĉe Monterey en la jaro 1770, ĉe San-Francisko en la jaro 1776, kaj fine ĉe Santa Barbara en la jaro 1782. Ili formis la centrojn de kvar "militaj kvartaloj" en kiujn oni dividis la provincon. Kune kun




la misiejoj, la fortresoj formis la kernon de la hispana imperia provinco de Supra Kalifornio.

La hispana imperio en Nordameriko daŭris ĝis la jaro 1821, kiam sendependiĝis Meksiko, parto de kiu estis Kalifornio. Kalifornio restis en Meksiko ĝis la meksika-usona milito en 1846, dum kiu okazis la "Urso-Flaga Ribelo," per kiu formiĝis La Respubliko de Kalifornio, nacio sendependa. Sed post kelkaj monatoj, la juna respubliko volonte aneksiĝis en Usonon. En la jaro 1850, Kalifornio iĝis la tridek-unua Usona ŝtato. Kaj la resto, kiel oni diras, estas historio!

—Neal

## Recepto

*Tiuj ĉi keksoj aperis (kaj plejparte malaperis) ĉe la ludovespero pasintsemajne:*

### Avenkeksoj kun kukurbo

- **2 tasoj (480 ml) da faruno**
- **1 ⅓ tasoj (320 ml) da avenflokoj**
- **1 tekulero (5 ml) da natria bikarbonato**
- **¾ tekulero (3 ml) da salo**
- **1 tekulero (5 ml) da cinamo**
- **½ tekulero (3 ml) da muskato**
- **1 ⅔ tasoj (400 ml) da sukero**
- **⅔ taso (160 ml) da kolzoleo**
- **2 servkuleroj (30 ml) da melaso**
- **1 taso (240 ml) da kaĉigita kukurbo**
- **1 tekulero (5 ml) da vanilo**
- **1 servkulero (15 ml) da muelitaj linosemoj *(nedeviga)***
- **1 taso (240 ml) da hakitaj juglandoj**
- **½ taso (120 ml) da sekvinberoj**

Varmigi bakfornon ĝis 350°F (177°C). Oleigi du bakpletojn.

Kunmisku la farunon, avenon, bikarbonaton, salon, kaj spicojn.

En alia bovlo, bone kunmiksu la sukeron, oleon, melason, kukurbon kaj vanilon (kaj linosemojn, se vi uzas). Enmiksu la sekajn ingrediencojn en la malsekajn iom post iom, faldadante la kunmetaĵon. Fine enfaldu la juglandojn kaj vinberojn.

Faligu servkulero-grandajn bulojn de la pasto sur la bakpletojn; lasu proksimume unu colon (2-3 cm) da spaco inter la buloj. Platigu iomete per forko kaj baku 16 minutojn.

Prenu el la forno kaj lasu iom firmiĝi du minutojn; poste metu la keksojn sur kradon por malvarmiĝi.

## *Ŝerc(aĉ)oj*

Je la tagmanĝo, kiel PIV salutas al PMEG?
"Bonan gramatikon!"
—*Aĉjo*

Kiel respondas PMEG al PIV?
"Bonan ata-iton!"
—*Liĉjo*

## *Ŝu-ŝajn':* kiu estis kiu?

1. Neal
2. Steven
3. Koto
4. Kristen
5. Helen
6. Indu
7. Mel
8. Esther
9. Dori
10. Meja
11. Hoss
12. Keneĉjo
13. Liĉjo
14. Simono
15. Birke
16. Lusi
17. Brandon
18. Ellen
19. Sasha
20. Bertilo
21. Alain